



# PENSEO

*N-ro 228*

*okt. / 2010*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Anteo (Ĉinio)



### ŝi revenis

ŝi revenis  
post dek jaroj  
en la sonĝo  
hieraŭ nokte  
sen lunlumo  
per vento aŭtuna  
tra la pordo nefermita

ŝi kuŝis sur min  
ankoraŭ freneze

pli soifa, ŝia lango  
trafis fajron  
rustiĝinta, mia mano  
perdis la vojon

kaptite de paniko  
ni faris plu nenion  
pro la pordo nefermita  
kaj la patrino  
dormanta en la  
alia lito en la sama ĉambro

ŝi foriris  
kun la vento  
senvorte  
en pluvo



pentrita de Eder Benedetti (Brazilo)

## Josip Pleadin (Kroatio)



### Du Kavaliroj

Rajdas du kavaliroj bravaj,  
du herooj de sangaj militoj:  
unu estas blanke vestita,  
la alia portas nigran flagon ...  
Ili ambaŭ havas kaskojn kaj kirasojn,  
kaj rapidajn ĉevalojn henajn,  
ĉe iliaj koksoj pendas ŝtalaj glavoj  
akraj kiel razilo kaj pezaj kiel plumbo ...  
La blanka kavaliro, tenera kaj milda  
al sia karulino parolas vortojn amikajn,  
kaj sidas kun ŝi, kaj ridas kun ŝi ...  
La nigra kavaliro, orgojla kaj kruela,  
hakas ŝin per sia aĉa rigardo,  
kaj frakasas ŝian fragilan korpon  
kaj svenigas ŝin per sia alveno  
kaj ŝian honton elvokas ...  
Ambaŭ ili postulas ŝian amon,  
ambaŭ sur siaj ŝildoj portas ŝian rubandon,  
sed, ho ve, ŝi ne povas kontentigi iliajn  
dezirojn ...  
Ili per malamika rigardo mezuras sin,  
ili minacas unu al la alia,  
ili svingas la akregajn glavojn ....  
Kaj ŝi ne povas fari ion ajn,  
ŝi ne povas ...  
ĉar ili estas ĝemeloj nedivideblaj ...



## Siv Burell (Svedio)



### *Jaron post jaro*

### *sidas la estrar'*

Jaron post jaro  
sidas estrar'  
reelektita  
de membroj sen bar'

Membroj kutimas  
al konata estrar'  
certe nur timas  
mem esti sur la ĉar'

La ĉaro de estraro  
nestabila estas  
misfaro, eraro ?  
sed estraro restas.

Post tempo ŝtoniĝas  
la vigla movad'  
ĉu inspiro troviĝas  
ĉe juna kread' ?

Sed kie vi estas  
vi juna dekumul'  
ĉu vi vin vestas  
por esti verkemul' ?

La kulpon por la stat'  
de nia movad'  
mi ĵetas al vi  
elektintoj en parad'.

Se vi helpus per konsil'  
pli agrabla estus sent'  
per via komputil'  
vi puŝu al turnvent'

La vent' kapiĉe blovu  
ispire al estrar'  
kaj iam oni povu

labori sen kompar'

por esperanto, por politika aŭ idealisma partio !

Aug. 2010

## Helena Tylipska (Italujo)



### *La ĉieloj*

La steloj malaperis en ĉielo.  
La konstelacioj disperdiĝis  
en strat-anguloj  
de niaj urboj bruantaj,  
vomantaj odoron de petrolo,  
sufokitaj de fum-vualo.  
La filoj de nia tempo  
fermitaj en siaj ĉambroj  
serĉas ĉielon lazuran  
en la vinda fenestro  
de siaj  
lastgeneraciaj komputoroj.

## Anna Karlik (Hungarujo)



### *Trankviligo*

Aprezi la bonojn  
mi ĉiam kapablas,  
Belajojn ekvidi  
mi neniam blindas.

Kredu, ke mi povas  
ankaŭ rideti,  
Malgraŭ la ŝajno  
bonhumora resti!

Ho, ne pensu pri mi:  
"ĉiam estas trista"  
Ja mi jam de jaroj  
stas Esperantista.

Ne nur malĝojadas,  
estas mi ridema,

Kvankam la poemon  
verkis mi tro prema.

Lasta mia verko  
estas deprimiga,  
Sed malesperiĝi  
Vi ne stas deviga!

Mi havas informojn  
tre bonajn nuntempe,  
Krome min sunbrilo  
gajigas ekzemple.

## Ĉineske

### Pusaman

*ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

### Cindy Mckee (Usono)



### Karnovora pejzaĝo

Jes, vivi estas lukti  
mi kapablis indukti.  
La Bono likis.  
Poste, sin flikis.

Sed, milda belo  
de el ĉielo  
gutis sur tero,  
sur la mizero.

Tial, grandaj okuloj  
de infanoj dum luloj  
kaj la mil floroj  
inter angoroj.

Aŭ la pejzaĝo  
estas vizaĝo  
eĉ karnovora,  
de Di' Adora.

### Mandio (Ĉinio)

## Se mi estus pasero

se mi estus pasero  
mi volus kun prefero  
flugi fojfoje  
kaj kanti ĝoje

super via kap'  
tra via pordklap'  
antaŭ l' fenestro  
per pepa orkestro

mia kanto el la kor'  
ravus vin en ĉiu hor'  
ĉu vi scias pri  
mia am-pasi'?

ĝi radikas jam  
kaj kreskas ĉiam  
en mia korfund'  
kun senta abund'

### Eto (Ĉinio)

## Dediĉe al deodaro

vi jen dum la tuta jar'  
prezentas kun malavar'  
verdon al la mond'  
kun prospera frond'

vi firme staras  
vi ne vulgaras  
pri ama sento  
en arba gento

pluvŝtormon ne timas vi  
nek ciklonon kun magi'  
vi restas en pret'  
firmas kun diskret'

pikilojn de fer'

levas kun koler'  
vi kontraŭ malvirt'  
kontraŭ kondut-flirt'



## Vejdo (Ĉinio)



# Cindrulino

—laŭ ĉineska skemo Sopir-al-sudo\*

Antaŭe  
vivis nobelo  
kiu havis filinon  
dolĉan plej sub ĉielo  
brilan kun belo.

Sed vee  
mortis edzino  
lia jen pro malsano  
laŭ fatala destino  
je viva fino.

La patro  
sin turnis al in'  
malica kaj kruela  
por familia kombin'  
kun sia filin'.

Novedzin'  
kun filinoj du  
sin montris mava al ŝi.  
Ŝi vivis nek kun vivĝu'  
nek feliĉa plu.

De tiam  
malbonhumora  
duonpatrin' insultis  
la knabinon orkoran

per voĉo rora.

Filinoj  
du ŝiaj same  
konduitis tre maldece  
kruela al ŝi jame  
ankaŭ sename.

La knabin'  
de tiu nobel'  
faris la hejmaferojn  
tutajn sub riproĉa pel'  
sen ajna ribel'.

Sed ŝi ne  
kuraĝis diri  
tion al sia patro  
nek ripozon deziri  
sed nur suspiri.

Ŝi ofte  
sidis post labor'  
ĉe cindro de la kamen'  
elĉerpita kun sangplor'  
kaj korpa dolor'.

De tiam  
ili nomis ŝin  
kun malestima tono  
la malbela Cindrulin'  
kun povra destin'.

Malgraŭe  
en ĉifona vest'  
ŝi ankoraŭ belis pli  
ol la du kun kor' de pest'  
en la luksa nest'.

Okazis  
la bal' de reĝid'.  
Li invitis fratinojn  
de l' patrino kun insid'  
kaj malica rid'.

Por vantec'  
la filinoj du  
okupiĝis pri vestoj  
plibelig' de korpkonstru'  
okulplaĉa ŝu'.

Pro tio  
povra Cindrulin'  
gladis kaj preparadis  
kostumojn kun dorso-klin'  
penegis sen fin'.

Sed ili  
laŭplaĉe per vok'  
kurigis ŝin labori  
endome de lok' al lok'  
ludis ŝin per mok'.

Cindrulin'  
kun honesta kor'  
pretigis ilin helpe  
obeis kun bonhumor'  
sen ajna langvor'.

Alvenis  
la tago de bal'.  
La du fratinoj ĝoje  
foriris al festival'  
sub nokta vual'.

Cindrulin'  
dum longa moment'  
sekvis ilin okule  
kun larmoj de pika sent'  
en plora silent'.

Kiam ŝi  
ploris en ĉagren'  
aperis baptopatrin'  
ŝia el fea teren'  
per venta alven'.

Do tiu  
demandis al ŝi

“Kial vi ploras, filin'?”  
Volus iri al bal' vi?  
Ha, vin heplu mi.”

“Do iru  
al via ĝarden'  
portu kukurbon al mi.”  
La knabino sen kompren'  
iris por ĝi jen.

La patrin'  
malplenigis ĝin  
lasante ŝelon nure.  
Ŝi kun magi-ilumin'  
tuŝis per verg-fin'.

Ha, strange!  
Fariĝis kaleŝ'  
ĝi tuj kun ora brilo.  
Kia mirakla sukces'  
loga al kares'.

Kaj poste  
tuŝis per verget'  
ŝi ses musojn en kaptil'.  
Ili fariĝis laŭ pet'  
ĉevaloj en pret'.

Ŝi ankaŭ  
el rategoj tri  
faris veturigistojn  
en vest' de ceremoni'  
per verga magi'.

Kaj plue  
la patrin-fein'  
transŝanĝis ses lacertojn  
al lakeoj kun anim'  
kaj kun disciplin'.

Demandis  
ŝi, “Ĉu kontenta?”  
al Cindrulino fine.  
“Sed por prezent' momenta

nur vest' maltenta?"

La fein'  
per sorĉa magi'  
ŝin tuŝis per vergeto.  
Tuj sidiĝis vest' sur ŝi  
bela kun or-stri'.

Kaj al ŝi  
fein' aldonis  
paron da vitraj ŝuoj  
kiujn la mond' ne konis  
kaj ŝi bezonis.

Laŭ admon'  
ŝi devis certe  
reveni antaŭ noktmez',  
alie senaverte  
malus konverte.

La knabin'  
vestita bele  
ekveturis en kaleŝ'  
al la palac' rekt-cele  
vere anĝele.

Laŭ raport'  
akceptis reĝid'  
ŝin el kaleŝo varme,  
paŝis ŝi sub lia gvid'  
en balon kun rid'.

En salon'  
regis silento.  
Ĉiujn ravis ŝia bel'  
de natura invento  
en ĉi momento.

Kaj poste  
ekbolis murmur'  
laŭda kaj admira pri  
ŝia beliga matur'  
kaj sorĉa figur'.



La princo  
petis ĝentile  
al ŝi danci rondire.  
Ŝi dancaŝis facile  
kaj valsis brile.

Dum paŭzo  
rigardo lia  
karesis ŝin ĉiame.  
Dronis li en pasia  
sento ebria.

Ŝiaj du  
fratinoj miris  
pri la raviga sceno.  
Ili arde deziris  
envie spiris.

Apude  
al fratinoj du  
ŝi prezentis frandaĵojn,  
sed ili ŝin en homflu'  
ne rekonis plu.

Proksime  
al noktmeza hor'  
ŝi haste reverencis  
al gereĝoj pro favor'  
kaj rapidis for.

Post kiam  
ŝi hejmeniris,  
al la baptopatrino  
ŝi dankajn vortojn diris  
balon admiris.

Ŝi petis

iri al la bal'  
por rigardi pli multe  
da personoj en danchal'  
sub lampluma pal'.

Nune du  
franjoj kun ekscit'  
revenis kaj pord-frapis.  
Ŝi malfermis ĝin kun glit'  
kvazaŭ el la lit'.

“Kial vi  
tiel malfruas?”  
sonis la dormema voĉ',  
“Ĉu l' bal' animon skuas  
kaj vi ĝin ĝuas?”

“Ja certe.  
Se ĉeestus vi,  
vi ja pri l' bela princin'  
mirus, ĉar elstaris ŝi  
en bala soci'.

Ankaŭ ŝi  
agis ĝentile  
al ni ambaŭ kaj donis  
fruktojn al ni humile.  
Kiel admire!

Neniu  
konas ŝin bone.  
Mi certas, ke l' princo ŝin  
volas koni persone  
eĉ se spione.”

“Kiel vi  
feliĉaj estas!  
Mi esperus, ke mi per  
bela jupo min vestas  
kaj ĝin ĉeestas!”

Ili ŝin  
mokis rikane  
pro ŝiaj turp' kaj povro.

Al ŝi ili ĉikane  
agis tirane.

Denove  
en la sekva tag'  
ili du iris al bal',  
ankaŭ ŝi per kaleŝ-vag'  
post beliga pak'.

La princo  
ĉiam ridplene  
sidis apud ŝi ame,  
alparolis senĝene  
komplezis pene.

La fraŭlin'  
dronis en plezur',  
jam forgesis promeson  
pri la noktmeza forkur'  
de amadventur'.

Eksonis  
la unua bat'  
de noktmez'. Jam leviĝis  
ŝi kaj kuris kiel kat'  
por temp-akurat'.

La princo  
sekvis ŝin kure.  
Dume ŝia vitra ŝu'  
defalis teren rule  
sur ŝtupon nure.



Ĝin levis  
kaj kaŝis reĝid'.  
Li vane ŝin atingis

pro ŝia granda rapid'  
jame ekster vid'.

Ŝi venis  
domen finfine,  
sen kleŝ', sen bela vesto,  
sed ĉio origine  
kovris ŝin ŝime.

Kiam du  
franjoj revenis,  
Cindrulino demandis  
ĉu l' belulin' alvenis  
kaj ĝui penis.

“Jes, ŝi ja  
venis kontente,  
sed ŝi foriris haste  
malaperis momente  
rapide vente.

Ŝi perdis  
vitran ŝuon jam,  
kaj l' princo ĝin konservis  
pro sia sento de am'  
por la svata dram'.”

Ververe  
anoncis reĝid'  
ke li edzinigos ŝin,  
kiu povas kun memfid'  
jen en koincid'

enmeti  
sian piedon  
en vitran ŝuon ĝuste,  
sen fari karnon per kned'  
sen ajna rimed'.

Komencis  
oni provi ĝin  
sur inoj en kortego,  
sed ne ili laŭ l' difin'  
taŭgis, kun deprim'.

Alportis  
oni la ŝuon  
al du franjoj por provi,  
ĝi ne sidis al duo  
jen kun kongruo.

Cindrulin'  
je l' unua vid'  
rekonis sian ŝuon.  
“Mi provu!” diris kun rid'  
ŝi tuj kun decid'.

Spite al  
ilia ridmok'  
ŝi ŝovis la piedon  
en vintan ŝuon ĉe l' lok'.  
Je ilia ŝok'

la ŝuo  
sidis tre bone  
jen al ŝi kiel ganto.  
Tio batis bastone  
ilin sensone!

Pliiĝis  
plu ilia mir'  
kiam ŝi duan ŝuon  
elpoŝigis per eltir'  
kun trankvila spir'.

Tiame  
venis la fein'.  
Ŝi frapis per vergeto  
la vestojon de l' knabin'  
kun granda fascin'.

Tujtuje  
beliĝis ĝi pli  
ja ol tiuj antaŭaj.  
Ŝi brilis per or-radi'  
pro fea magi'.

Du franjoj



rekonis fine  
 en ŝi l' belan fraŭlinon,  
 pardonpetis kapkline  
 des pli inkline.

Ŝi kisis  
 ilin kun amem'  
 kaj indulgis fiagojn  
 iliajn, mildigis mem  
 ilin kun kortrem'.

Okazis  
 nupto solene  
 inter ŝi kaj la princo.  
 Ĉiuj gastis festene  
 ĝuis senĝene.

Cindrulin'  
 bona kaj bela  
 loĝigis siajn franjojn  
 en la palac' fabela  
 luksa kaj hela.

Nu, ili  
 en la sama tag'  
 edziniĝis en palac'  
 jen ekster sia imag'  
 en celebra ag'.

*\*Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

## Maupassant (1850-1893)



### Aventuroj de Walte Schnaffs

Ekde kiam Walter Schnaffs eniris en Francujon kun la agresantaj trupoj, li konsideris sin mem kiel la plej malfeliĉan homon. Pro graseco li marŝis kun malfacileco, senĉese anhelante kaj des pli pro sia paro da dikgrasaj plataj piedoj, li sentis netolereblan doloron dum irado. Kaj li estis

pacama bonvolulo, li absolute ne noblanima aŭ sangavida persono. Li estas patro de kvar infanoj, kiujn li profunde amis. Lia edzino estis juna virino kun blondaj haroj, kaj ĉiun vesperon li afliktite sopiris al ŝi, kiu donis al li tenerecon, prizorgemon kaj kisojn. Li ŝatis enlitiĝi frue kaj ellitiĝi malfrue, gustumi malrapide bongustajn manĝaĵojn kaj trinki glason da biero en la etaj vinvendejoj. Krome, li pensis, ke ĉiuj belaj objektoj en la mondo ne ekzistas kun malapero de la vivo; tial li gardis en la koro instinktan, samtempe racian kaj ekstreman malamon al la kanonoj, fusiloj, revolveroj kaj sabroj, precipe al bajonetoj, ĉar li sin sentis, ke li ne povis manipuli kun fleksebleco ĉi tiuj armiloj, kiuj bezonis rapidajn movojn por defendi sian grasan ventron.

Nokte, kiam li kuŝis sur la tero, envolvita en sia mantelo, ĉe la flanko de ronkantaj kamaradoj, li longe sopiris al siaj familianoj restantaj tiuflanke kaj pensis pri la danĝeroj embuskantaj sur la vojo: “Se mi estos mortigita, kio okazos [fariĝos] al miaj infanoj? Kiu do ilin vivtenos kaj ilin edukos?” Nun ili estas tre malriĉaj, malgraŭ ke mi donis al ili kelke da arĝentaj moneroj, kiujn mi prunteprenis ĉe mia ekiro.” Ĉiufoje, kiam li pensis pri tio, Walter Schnaffs ploris kelkfoje.

En komenco de batalo li sin sentis malforta je gamboj. Se li ne pensis, ke, se li falus, la aliaj armeanoj estus tretpasontaj sur lia korpo, li jam estus falinta sur la teron. La siblado de flugantaj kugloj jam starigis al li la haŭtharojn.

Dum pluraj monatoj li vivis tiel en la teruro kaj turmentiĝo.

Lia korpuso antaŭenmarŝis al la Normandie. Iun tagon li estis sendita fari skoltadon kun malgranda taĉmento por nur priserĉis parton de la regiono kaj reiri tuj poste. Ĉio ŝajnis kvieta en la kamparo, tie troviĝis nenia signo de rezistado.

Tamen, kiam la prusoj malsupreniris an la valeton, en kiu punktiĝis profundaj kavoj, salvo de pafado haltigis ilin. Ĉirkaŭ 20 inter ili jam estis faligita. Trupo de franc-tiraljonoj [parzanoj] subite elsaltis de arbareto granda kiel mano, sin antaŭenjetis per rapidaj kaj grandaj paŝoj, kaj fiksis la bajoneton al la pafiltubo.

Walter Schnaffs senmove staris tie en la komenco, kaj li estis tian timegon, ke li eĉ ne pensis pri forkuro. Poste li estis kaptita de forta deziro forkuri. Sed li tuj pensis, ke kompare kun malgrasaj kaj malgrandaj francoj, kiuj petolsaltante venis kiel trupo da kaproj, li

kuris kiel testudo. Tiam li rimarkis, ke ses paŝojn antaŭ li troviĝas larĝa fosego plena de dornarbetaĵoj kaj kovrita de sekiĝintaj folioj, kaj li ensaltis kuniginte du piedojn, senkonsidere pri ĝia profundeco, kvazaŭ ensaltante de ponto en riveron.

Kiel sago, li trapis dikan tavolon da lianoj kaj dornarabetoj. Liaj vizaĝo kaj manoj gratvundiĝis, kaj li peze sidiĝis sur ŝtonon de la fosega fundo.

Tuj levante la kapon li rigardis supren la ĉielon tra truo kiun li faris. Sed ĉi tiu truo eblis malkaŝi lin. Kaj li singardeme rampis kvarpiede kiel eble plej rapide tra interplektitaj branĉoj al la fundo de la fosego por esti malproksime de la batalejo. Baldaŭ poste li haltis kaj residiĝis, kuntirigante kiel kapro meze de la altaj velkintaj herboj.

Dum kelka tempo, li ankoraŭ aŭdis eksplodajn bruojn, kriojn kaj ĝemojn. Poste la krioj de la batalo malfortiĝis kaj ĉesis. Ĉio ree fariĝis silenta kaj kvietita.

Subite io ŝanceliĝis ĉe lia flanko. Li saltleviĝis de timo. Tio estis nenio alia ol birdeto, kiu fluge falis sur la branĉon kaj tiel skuis velkintajn foliojn. Ĝuste pro tio, lia koro forte batis, preskaŭ dum unu horo.

La nokto falis kaj la mallumo envolvis ravinon. La soldato profunde enpensiĝis. Kion li devis fari? Kia li estis fariĝonta? Ĉu li iris kuratingi sian armeon?... Sed kiel? Kien li iris? Se li estis kuratingonta sian armeon, li estis revivonta la teruran vivon de afliktoj, timigo kaj suferoj de post la komenco de la milito! Ne! Li sentis, ke li ne plu havas tian kuraĝon! Li ne plu havis sufiĉe da forto por elteni la suferojn dum marŝado kaj alfronti la danĝerojn, kiuj povis okazi ĉiam kaj ĉie.

Sed kion fari? Li ne povis ĉiam resti en la ravino kaj sin kaŝi ĝis la fino de milito. Ne, certe. Se li ne bezonus manĝi, ĉi tiu perspektivo ne tro terurus lin; sed li bezonis manĝi kaj manĝi ĉiutage.

Li sin mem sentis sola, kun armiloj, kun uniformo, sur la teritorio de malamiko, for de tiuj, kiuj povis defendi lin. Ekstremo trakuris lian korpon.

Subite li pensis: "Se mi estus kaptito!" Kaj en lia koro estiĝis deziro, tre forta deziro, nevenkeblan deziro: esti kaptito de francoj. Kiel kaptito, li estos savita, bone nutrita, loĝigita, ŝirmita kontraŭ kugloj kaj sabroj, sen ajna maltrankvilo, en bone gardata prizono. Kiel bela revo! Li tuj prenis firman decidon:

—Mi mem iras kaptulaci por fariĝi kaptito.

Stariĝinte, li decidis efektiviĝi tiun ĉi projekton sen perdi eĉ unu minuton. Sed li subite fariĝis senmova, atakita de malagrablaj ideoj kaj nova timo.

Kien li iris esti kaptito? Kiel? Al kia direkto li iris? En tiu ĉi momento timindaj bildoj, la bildoj de morto svarmis en lian kapon..

Kun pinta kasko, li rabie kuradis sur la kampoj sole, riskante grandajn danĝerojn.

Se li renkontos kamparanojn? Tiuj, vidante pruson sendefenda, mortigos lin kiel senhejman hundon! Ili lin buĉos per forkegoj, pioĉoj, falĉiloj kaj ŝpatoj! Ili faros el li viandan pulpon per frenezeco de kolerigitaj venkitoj.

Se li renkontos francajn gerilanojn? Ili estas frenezuloj, kiuj observas nek leĝojn nek disciplinon. Por sin amuzi ĉirkaŭ unu horon, ili pririgardos lian kapon aŭ primokos lin, kaj fine lin pafmortigos. Tio ideo sentigis lin sia korpo jam apogi al muro, vizaĝe al dek du pafiltuboj, ĉi tiuj dek du nigraj kaj rondaj truetoj ŝajnis lin rigardi.

Se li renkontos la francan trupon? Tiuj avangardaj trupanoj prenos lin por skolto, aŭdaca kaj ruzema, kiu sola spionas, kaj pafos al li. Li malesperis kaj residiĝis. Li falis en seneliran situacion.

La nokto estis profunda, ĉi tiu estis silenta kaj nigra nokto. Li ne moviĝis plu. Se nur aŭdante ian ajn malpezajn kaj nekonatajn bruojn, li eksaltis de ektimego. La brueto de leporo, kies vosto ektuŝis la enirejon de kaverno, prekaŭ lin timigis por forkuro. La ululado de strigoj tremigis lin, tiel ke subita timo trakuris lian korpon, kvazaŭ kaŭzante doloron de vundo. Li gvatis per larĝe malfermitaj okuloj en la mallumo; Li imagis ĉiumomente, ke li aŭdis onin marŝi ĉirkaŭ li.

Post longa nokto kaj damninda teruro, li finfine ekvidis tra la branĉoj surkape, ke la ĉielo jam klariĝis. Li eksentis grandegan trankviliĝon; liaj membroj malstreĉiĝis; lia koro kvietiĝis; kaj liaj okuloj fermiĝis, tiel ke li endormiĝis.

Kiam li vekigis, la suno proksimiĝis al la zenito de la ĉielo. Certe jam estis tagmezo. Sur la kampo regis kvieteco, tristeco kaj tomba silento. Kaj li sentis teruran malsaton.

Li oscedis. Li salivumis je ekpenso pri kolbasoj, la bonaj kolbasoj, kiuj soldatoj manĝis. Li sentis malkomfortecon en la stomako.

Li stariĝis kaj iris kelkajn paŝojn. Li sentis, ke liaj gamboj estis malfortaj, kaj li

residiĝis por mediti. Dum du aŭ tri horoj li ankoraŭ pezis la por kaj la kontraŭ kaj ĉiumomente ŝanĝis sian decidon, li for-refoje pripensis de pozitivaj kaj negativaj kialoj, tia ideologia batalosentis al li doloron.

Li finfine elpensis racian kaj praktikan solvon: Li atendos ĝis kiam kamparano, sen armiloj nek danĝeraj agrikulturiloj, sole pasos tie, li alkuris antaŭ lin, klarigante al li, ke li volos kapitulaci kaj submetiĝi al lia dispono.

Li do demetis sian kaskon, ĉar ĝia pinto povis malkaŝi lin. Li etendis sian kapon el la kaŝejo kun granda singardemo.

Nenia estaĵo montriĝis sur la horizonto. Maldekstre, li ekvidis grandan citadelon kun turoj ĉe ambaŭ flanko, trans suproj de arboj ĉe avenuo.

Li atendis ĝis vespero, sed li nur vidis korvojn rondflugi kaj aŭdis murmuradon de sia malsata stomako. Li sentis grandan aflikton.

La nokto denove falis sur lin.

Kuŝante sur la fundo de la fosaĵo, li sentis grandan maltrankvilon kaj teruran malsaton, tiel ke li ne povis bone dormi, kaj ofte atakate de premsonĝoj.

La aŭroro leviĝis denove super lia kapo. Li rekomencis observon. Sed la kamparo restis neniue, kiel la hieraŭo. Kaj nova timo, la timo de morti de malsato, venis en la kapo de Walter Schnaffs! Ŝajnis, ke li vidis lin mem fermi la okulojn kaj kuŝi sur la dorso en la fundo de truo. Poste bestoj, diversaj bestetoj proksimiĝus al lia kadavro kaj komencus manĝi lin, samtempe estus atakinte lin ĉie de lia korpo, ili enŝovus sub liaj vestoj por mordi lian ĝlacie malvarman haŭton. Granda korvo bekus per longa kaj maldika beko liajn okulojn.

Tiam, li fariĝis freneza, kvazaŭ li tuj svenus de malforto kaj ne povus plu marŝi. Kaj spite al ĉio kaj riskante ĉion, li pretis rapidi al la vilaĝo, sed ekvidante tri kampulojn kun longtenilaj forkoj surŝultre iri labori sur la kampoj, li ree eniĝis en la kaŝejon.

Ĉe noktigo, kiam regis obsekuro sur la ebenaĵo, li malrapide elrampis el la fosego, kaj kun kurbigita dorso kaj batanta koro, iris al malproksima kastelo. Li preferis eniri en la kastelon ol en la vilaĝon, kiu ŝajnis al li timinda kaverno, kie loĝis multaj tigroj.

Tra la fenestroj de ĝia teretaĝo videbliĝis lamplumo kaj unu el ili estis eĉ malfermita. De tiu ĉi fenestro ellasiĝis fortaodoro, kiu subite penetris, tra la nazo, ĝis la ventron de Walter Schnaffs, konvulsigante kaj spiregante

lin. Li estis nesinregeme tirita de ĝi, kaj naskis aŭdacon de batalemo.

Senpripense li subite aperis antaŭ la fenestrobreto, ankoraŭ kun kasko sur la kapo.

Ok servistoj vespermanĝis ĉirkaŭ granda tablo. Sed servistino subite malfermis la buŝon, faligis la glason en mano sur la teron, kaj fiksrigardis en stuporo.

Oni rimarkis malamikon!

Dio! La prusoj atakas la kastelon!...

Ea la komenco tiu ĉi estis unu krio, ok homoj eligis per ok malsamaj tonoj, unu timindan krion, poste kaskado da bruo de forkuro. Poste bruo de tumulta forkurado.

Ĉiuj interpuŝiĝis kaj interkonfuziĝis, ili kuris per ĉiuj siaj fortoj al la pordon de tiu ekstremaĵo. La seĝoj renversiĝis, la viroj renversis la virinojn kaj piedpaŝis de sur iliaj korpoj. En fulmodaŭra momento la homoj tute forkuris en la ĉambro estis neniue, postlasis plenan tablon da manĝaĵoj. Rigardante la manĝaĵojn en la vizaĝo, Walter Schnaffs restis ŝtuniĝinta pro teruro, ĉiam staris antaŭ la fenestrobreto.

Hezitante iom, li transgrimis enen kaj sin ĵetis al la pladoj sur la tablo. Kvankam pro akra malsato li tremis tra la korpo, kiel februlo, timo detenis lin de plua ago. Ĉiuj pordoj estis fermitaj, kaj sur la supra planko aŭdiĝis rapidemaj paŝoj; La maltrankvila pruso atenteme aŭskultis al tiu bruo; Poste li aŭdis pezajn sonojn, kvazaŭ iu saltua el la dua etaĝo kaj lia korpo frapus la molan teron ĉe la piedo de muro.

Baldaŭ poste ĉiuj movoj, ĉiuj tumultoj ĉesis, kaj la kastelo fariĝis silenta kiel tombo.

Walter Schnaffs sidiĝinte antaŭ telero netuŝita, ekmanĝis. Li manĝis per grandaj buŝplenoj, kvazaŭ timeante ke iu interrompus lin antaŭ ol li manĝas sufiĉe. Li ĵetis per ambaŭ manoj pecegojn da manĝaĵo en sian faŭkan buŝon similan al enfalujo. La pecegoj da nutraĵo pufiĝis la gorĝo, kiu grandiĝis preskaŭ ĝis kreviĝo, kaj li ne devis ne halti por momento. Li iris trinki cidron el la ĵaro por purlavi sian ezofagon, kvazaŭ oni dragus la blokitan kloakon.

Li formanĝis la aĵojn en ĉiuj teleretoj, teleroj kaj boteloj; li estis drinkinta kaj manĝinta ĝis plena kontentiĝo, havis konfuzitan kapon, havis tre riĝan vizaĝkoloron, singultis iam kaj iam, la korpo ĉiam tremis pro singulto, la cerbo estis konfuza kaj la buŝo estis grasa. Li disbutonigis sian uniformon por spirado, li jam ne povis moviĝi eĉ unu paŝo. Lia okuloj fermiĝis, lia cerbo estis komata; li klinis pezan frunton kroce metante siajn

